ALCIONE NITHA
Jataí, 865/1402
POA
90820-190

GISTO, Julio-2004.
G.O.VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo – RS
Otto@caiweb.com.br

TTT-kongrua Esperanto

RADIONDA PROPAGADO

Miaj tre karaj legantoj, alvenis la semajno kiam komencigxis la 89ª Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. Tre forte mi esperas, ke chiu fervora esperantisto akiris sian radioricevilon, por gxui la Kongresajn erojn kvazau oni persone cheestas en la chefurbo de Esperantio dum tiu semajno. De antau monatoj Gisto rekomendas akiri ricevilon, informis kie surstrate en Porto Alegre acheteblas je malalta prezo. Aldone estis informo, ke oni achetu en la horo oka gxis la naua, dum CRI estas audebla, por tuj konstati chu la aparato kapablas kapti la radiondojn venintajn el Chinio.(Kelkaj ne!) Bonsxance en chi tagoj la ondodisvastigxo farigxis escepte bona. Nia kara Ennio (Torres) informis, ke li bone audas la radion sen aldona anteno...ech sen la teleskopa anteno, en 7150 Khc. Lau lia konsilo, por homoj kiuj ne lertas pri kurtondaj auskultadoj, mi helpas, por gxuste agordi la radion: vi elektu la bendon kie aperas la frekvenco 7,05 Mhc. La venonta cifero eble estas 7,20 Mhc. Tio dependas de la fabrikanto. Vi devas agi, dum CRI audeblas, en la spaco duone inter 7,10 kaj 7,20 Mhc. Je iomete da pacienco, gxusta tempe, vi baldau audos la fortan signalon sur 7150 Khc, des pli se vi aldonis 10 au 20m da maldika drato al la teleskopa anteno. – Kiu ne klopodas auskulti CRI dum la UKE, tiu ne rajtas nomi sin fidela esperantisto. Foje nia veterana parolistino Roza aperas, nur por deziri Bonan Vesperon al siaj resopiroplenaj auskultantoj. Oni ne forgesas la tembron de sxia agrabla vocho.

89ª UKE – PEKINO

Pro perspektivo sxangxi mian komputilon en venontaj tagoj, mi tajpas Giston iom pli frue, 25/7, kaj do iom raportas pri la inauguro de la Kongreso, okazinta hodiau. – Unue okazis iom da echo, pro la vasteco de la ejo. Laudinde parolis sinjorino nome de LKK kiu salute bonvenigis chiujn, deziris plenagrablajn kongresajn tagojn kaj kortusxe humile petis pardonon pro eblaj malglatajxoj trovataj; poste vochigis siajn klerajn pensojn nia veterana batalanto, Drº. Humphrej Tonkin kaj nia nuna UEA-prezidanto Renato Korseti, nun preskau sen la gxena echo. Tondraj aplaudoj plenplenigis la salonon. Fervora auskultanto sentis sin sursxutita de verda etoso, far mi ne plene priskribebla. Chiu nepre devas iam persone cheesti Kongreson, por senti la dusxon el esperantismo.

BESTAMIKOJ

Chi-semajno la deputitaro devis decidi, chu spiritualismaj sektoj rajtas au ne, mortigi animalojn dum iliaj ritoj. Chu ankau vi faris vian parton en konsciigo kontrau tia fikutimo? Amikino Vilma, 72 jara, dejxoris dum la tuta nokto antau la guberniestrejo, cele klini la sancion favore al la povraj mortigotaj bestoj. Kia diabla potenco bezonas ke homoj versxu sangon de senkulpaj animaloj, por ke avidaj interesatoj pri avantagxoj estu favorataj? Fine

Kiam vi ne trinkas kafon ĉe mi la etoso farigas malpli feliĉa !

Amike,

Vaske
040804

la projekto estis sankciita, ne tute favora al la kondamnitaj vivuloj: nun ili rajtas mortigi ne katojn kaj hundojn sed jes animalojn kies viando taugas por homa nutrado.

BONHUMORA ONO

CHE SEKSOLOGO.

Juna paro iras al konsultejo de seksologo. La doktoro enlasas ilin kaj demandas, pri kio li povos helpi ilin. La viro diras: chu vi povas observi nin, dum ni du seksumas? Surprizite la kuracisto jesas kaj observas. Kiam la seksrilato finigxas, li atestas: -" Mi vidas nenion nenormalan dum vi seksumas". La intervjuo finigxas kaj la doktoro informas: "La konsulto kostas 60 Realojn. Bonan vesperon!"- La sama sceno ripetigxas dum pluraj semajnoj. La paro alvenas je interkonsentita horo, seksumas, pagas kaj adiauas. La kuracisto farigxas ekscitite scivola kaj decidis demandi:

- Sed, karaj junuloj, kion vi celas malkovri?

- "Ach, doktoro, ni volas malkovri nenion. Nia problemo estas ke sxi estas edzigxinta. Ankau mi. Ni ne povas iri unu al la domo de la dua. En motelo oni postulas 100 au 120 Realojn. Chi tie mi pagas R$ 60,00 kun la rajto al remborso de 40 Realoj far mia antauzorga sanplano. Aldone mi rajtas al rabato, kiel sanzorgado, en mia rentodeklaro".

Kun permeso de la rerakontintaj samideanoj Ereno/Ennio, jen inreresa specimeno: JXALUZO – Hejmen alveninta edzo, per kiseto salutas sian edzinon. Sxi akurate ekzamenas lian palton kaj trovis blondan haron. Tre serioze sxi akuzas: "vi trompas min kun blondulino!" Li defendas sin. – Ne, mi neniam trompis vin. Chi haro eble falis sur mian palton surstrate au en buso. Longa kverelo sekvas...

Sekvan tagon la virino denove ekzamenas lian palton kaj trovas brunan haron. – "Chifoje vi trompis min kun brunulino". Okazas la kutima kverelo inter ili, li chiam defendas sin asertante ke trompo neniam okazis. Tagojn poste, post atenta serchado, la virino denove trovas haron sur lia palto, chifoje krispan haron. – "Senhontulo, kanajlo...hodiau vi trompis min kun nigrulino!" – Li, senkulpa, chion faris siadefende kaj elpensis ruzajxon. En kvara tago li zorge pakis kaj kunportis tute puran palton. Antau ol revene reeniri sian hejmon la edzo demetis la uzitan kaj surmetis la kunportitan puran palton. La virino, jam delonge persekutema, denove, plejatente ekzamenis la palton de sia edzo, trovis neniun haron sed refoje eksplodis, akuzeme kaj lautvoche kriis: - Vi, nekorektebla, malfidinda trompulo! Ech kun kalva, skabia senharulino vi trompis min!!!

MENSOGISTO.

Sankta Petro baras viron che la chiela enirejo: - Timige li alparolas la hasteman alveninton: "Hej, kie vi pensas, vi rajtas iri? – Vi troe mensogis dum via tuta vivo, por eniri en la Paradizon". – "Estu kompatema, rediras la viro...ankau vi estis fisxkaptisto".

VAKERO

Tute furioza vakero eniras dinkejon, forte frapas sur la vendotablon kaj demandas: "Kiu farbis mian chevalon verde?"- La salono plena de viroj restis silenta...neniu pepas. Denove li ripetas la demandon kaj pafas supren. Tiam ulo, eble duoble pli fortika, lante starigxas kaj diras – "Estis mi kiu farbis vian chevalon. Kial ? Chu la koloro ne plachas al vi?

Nun la vakero diras: "Mi volas informi vin ke, se vi volas refarbi gxin, jam eblas. La farbo unue aplikita jam sekigxis".